n-ro 35

Februaro 1991

Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

# La Merkato

Eventuale ni estonte enmetos bildon je tiu ĉi loko; ĉu ni faru?

**Enhavo**:

| | | |
|---|---|---|
| Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj ........ | | 2 |
| Saluton ................................................ | dk | 3 |
| Eŭropa Kunveno de Esperanto en Verona, Italio ....... | FJB | 3 |
| Malferma letero de la Prezidanto ...................... | FJB | 4 |
| IKEF rajtas nomumi UEA-komitatanon .................. | FJB | 5 |
| Interŝanĝo de informoj kun alta lernejo el Ĉeĥoslavakio ..................................... | RR/dk | 5 |
| Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton? ..... | Ruig | 6 |
| "Curriculum Vitae de Inĝ. Kees Ruig" ............. | Ruig | 7 |
| Taal en Bedrijf (Lingvo kaj Entrepreno) .............. | RR | 8 |
| Anonco de UEA ........................................... | | 9 |
| Komercdeziraj leteroj! ................................ | dk | 10 |
| Esperanto por Gastlaboristoj ........................ | Ivo Durwael | 11 |
| Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj! ................ | RR/dk | 12 |
| Adresŝanĝoj; jen la novaj ........................ | RR/dk | 12 |
| Donacoj ................................................ | dk | 12 |
| In-Vento ............................................... | dk | 12 |
| Rajtoj de represo, Reklamtarifoj ktp. ............... | dk | 12 |

La Merkato (LM) estas organo de IKEF; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:
Ĉe s-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8,
D-W7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membrara administrado:
Ĉe s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97,
B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

Redaktora sidejo:
Ĉe s-ro Daniel **König**, Schwarzwaldstraße 47
D-W6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

---

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.
Kontoj: Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c,
*aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83,
je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:
***Francio***: S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau,
F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)
***FR Germanio***: S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8,
D-w7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
***Hispanio***: S-ro Pedro Antonio **Macanás Valverde**,
Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia,
(Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codorníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1250 ptas.)
***Hungario***: D-ro István **Gether**,
Berényi ul.8 I/6, H-1027 Budapest
***Italio***: D-ro Marco **Picasso**,
via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
***Japanio***: S-ro Seikô **Yamasaki**,
185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12,
(Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
***Jugoslavio***: S-ro Sotir **Taleski**,
ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
***Togolando***: S-ro Gbeglo **Koffi**,
B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Saluton

Estimataj gesinjoroj, karaj gelegantoj,

por produkti indan revueton nepre bezonas vian komunikadon. Ni firme petas: sendu raportetojn kaj pri viaj spertoj kaj pri viaj deziroj komercrilate. Etaj informoj poŝtkarte efikas, eĉ tre bonvenas. Jes ja, la inta malreguleca aperritmo de **LM** kauzis alie. Ankaŭ mi kulpas - pardonu!

Tamen, intertempe iomete pligrandiĝis nia grupo. Lastjare okazis du gravaj eventoj je kiuj IKEF kunagis; la IKEFa programo dum la Bergena UK - vizito de komerca altlernejo kaj de la firmao Statoil - kaj la foiro "China aktief" en Oostende. Eble vi samopinias ke ankoraŭ bezonas grandajn paŝojn ĝis videblas profundaj sukcesaj rezultoj. Ni celu efikan komunikadon al ege pli da personoj ol ricevantoj de tiu kajero. Disvastigu informojn - "inform-agu"!

Agrablan legadon deziras

David König

/dk

---

## Eŭropa Kunveno de Esperanto en Verona, Italio

De la 5a ĝis la 11a de junio 1992 okazos en Verona, Italio,

> Eŭropa Kongreso sub la temo
> "La interkomunikado en Eŭropo:
> Disfaligi la lingvajn murojn",
> aranĝita kaj organizita de
> Eŭropa Esperanto Unio.

Kadre de tiu grava aranĝo okaziĝos kunvenoj de fakaj asocioj (laŭ programo je pentekosta dimanĉo 7a de junio, $15.^{00}$ h). IKEF planas tian fakkunsidon. Ni volas tion anonci al vi. Pliaj informoj sekvos en venonta "La Merkato".
Michael Lipari Sato, v.le Giulio Cesare, 223, I-00192 Roma
tel: 06.380839, telekopiilo: 06.310292 /FJB

## Malfermita letero de la Prezidanto

Estimataj gekolegoj,

rapidege pasis la jaro 1991. En mia antaŭa malferma letero en n-ro 33 de januaro 1991 (paĝo 5) mi menciis la gravan, lancopintan rolon, kiun IKEF povus ludi por Esperanto. Dekdu monatojn poste mi povas konfirmi tion el la travivaĵoj de la jaro 1991. Du aferojn de tiu jaro mi volas prilumi: Unue nian Generalan Kunvenon dum la UK en Bergen, en kiu UEA-estrarano Princz reliefigis tiun gravan rolon de IKEF kaj laŭdis nian celdirektan agadon, kiun ni tuj poste pruvis per la vizitoj ĉe la Komerca Altlernejo kaj ĉe la firmao Statoil en Bergen (vidu La Merkato n-ro 34). Due la Esperanto-simpozion je la 5a de oktobro 1991 en Oostende, Belgio, en la kadro de la ĉina ekspozicio "CHINA AKTIEF" (Ĉinio aktive), kiun partoprenis kelkaj IKEF-anoj, i.a. sur la podio s-ro Maertens (UEA-estrarano), s-ro Ruig kaj mi. En la UEA-organo "esperanto" sur paĝo 177 kaj ankaŭ en ĉi tiu numero de "La Merkato" troviĝas raportoj pri tiu ekzempla aranĝo. S-ro Maertens eksplicite nomis IKEF unu el la nun plej gravaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA.

Mi konfesas, ke tia bonintenca laŭdo de aŭtoritatulo elvokas tre agrablan senton en la spirito de laŭdito, kaj ĝi ankaŭ signifas bonefikan instigon al plulaboro sur nia kampo, kie sukcesoj ne estas memkompreneblaj. Tamen mi devas koncedi, ke tia laŭdo nuntempe ankoraŭ ŝajnas al mi iom da troigo kompare al la multaj agadeblecoj ankoraŭ ne prilaboritaj fare de 102-persona fakgrupo.

Ĉe tio necesas ankaŭ klarigi, por mi mem kaj por aliaj aktivuloj, ke por homo en profesie responsa okupo bedaŭrinde restas ne sufiĉe da liberaj horoj por la ŝatata okupo "Esperanto en komercon kaj ekonomi(k)on", aparte kiam aldoniĝas familiaj aŭ aliaj privataj problemoj. Do mi petas la komprenemon de ĉiuj membroj, se foje malfruiĝas komunikiloj aŭ estas ne plenumitaj aliaj taskoj en deca tempodaŭro.

Unu el niaj plej gravaj estontaj agadoj estos la perado de ofertoj pri varoj aŭ servoj de komercistaj Esperantistoj el "oriento" (Ĉinio kaj ekssocialismaj landoj) kaj el la "Tria Mondo" al eblaj aĉetantoj en "okcidento". Konsidere al la granda alfluo de tiaj ofertoj al multaj de ni, tio estis la precipa temo de nia Generala Kunveno en Bergen. La estraro estas preparonta solvon pro efika utiligo de tiuj ofertoj.

Finfine mi deziras al vi, estimataj membroj, kunlaborantoj en nia interesa afero IKEF, ke vi havu en 1992 sufiĉe da liberaj horoj kaj multe da energio por sukcesa agado por IKEF. La redaktoro volonte atendas viajn raportojn por aperigo en "La Merkato".

Samideane via

*Franz Josef Braun*



## IKEF rajtas nomumi UEA-komitatanon

Laŭ "Statuto de UEA", faka asocio aliĝinta al UEA rajtas esti reprezentata en la Komitato de UEA per aparta komitatano, kondiĉe ke tiu faka asocio hava minimume cent membrojn. IKEF havas nun 102 membrojn kaj rajtas tial nomumi tian komitatanon el sia membraro.

La komitato estas la supera organo de UEA. Ĝi kunsidas ĉiujare dum la Universala Kongreso kaj laboras perpoŝte dum la cetera jaro. La Komitatanoj havas trijaran oficperiodon. Paragrafo 29 de la UEA-statuto priskribas la kompetentecojn de la Komitato jene:

La Komitato
(a) elektas inter siaj membroj Prezidanton (de UEA), unu aŭ du Vicprezidantojn, Generalan Sekretarion kaj du ĝis kvin pliajn membrojn de la Estraro;
(b) rajtas nomi honorajn prezidantojn, honorajn membrojn kaj membrojn de la Honora Patrona Komitato;
(c) difinas la ĝeneralan agadon de UEA;
(ĉ) decidas pri aliĝo de landaj kaj fakaj asocioj kaj pri kontraktoj kun kunlaborantaj organizaĵoj;
(d) decidas pri la regularoj;
(e) decidas pri la buĝeto kaj ekzamenas la financojn de la Asocio;
(f) decidas pri la agado de la Estraro;
(g) fiksas la kotizojn.

Ni demandas niajn membrojn, kiu el vi estus preta transpreni ĉi tiun rolon por IKEF ĉe UEA. Laŭstatuta kondiĉo estas, ke li/ŝi estu individua membro de UEA jam dum du jaroj antaŭ la elektiĝo (do almenaŭ ekde 1990) kaj ke li/ŝi restu individua membro tra la tuta ofica periodo, t.e. 1992-1995. Kompreneble UEA atendas, ke tiu komitatano ĉeestos la kunsidojn dum la Universalaj Kongresoj.

Tiuj membroj, kiu pretas transpreni por IKEF la rolon de UEA-komitatano, bonvolu anonci sin al la Prezidanto Franz.

*Franz Josef Braun*

## Interŝanĝo de informoj kun alta lernejo el Ĉeĥoslovakio

S-ro Milos Bultas estas ekonomo kiu instruas en alta lernejo en Ostrava. Li serĉas personojn (profesorojn, studentojn...) kiuj per korespondado povas reciproke havigi objektivajn informojn kaj profesiajn spertojn.

Adreso: Kasarenska 1, CS-746 01 OPAVA.

RR/dk

## Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?

La sekvantan prelegon brile prezentis antaŭ interesita publiko s-ro Ruig okaze de la Esperanto-Simpozio je ĉina foiro pri ekstera komerco en Oostende, Belgio, oktobro 1991.

"Lingvo ne estas celo (nur kiam oni studas ĝin literaturcele), sed ilo: komunikilo.

Edukado / Instruado komplikiĝas: oni devas studi tro multe da fakoj: Mankas tempo por studi multajn lingvojn. Eŭropanoj ofte ne tiom malfacile perceptas tion, ĉar studo de alia eŭropa lingvo ne estas tiom malfacila por talentulo, sed por ĉinoj kun sia tute diferencstruktura lingvo tio estas grandega problemo. Ili devas investi tiom da tempo en lingvostudado, ke restas tro malmulta tempo por aliaj studceloj. Estas severa handikapo kaj tiel rezultas en diskriminadon: en la komunikado, en la negocado. Tio estas neakceptebla situacio.

La Esperanto-movado kunkulpas pri malĝusta reputacio de la internacia lingvo. UEA tro flegis Esperanton kune kun la Interna Ideo en la literatura kampo, en la "mola sektoro" kiel celo en granda rondo familia.

Zamenhof semis, la Esperanto-movado flegis, verdigis la planton. Nun venas la horo de la vero: la tempo por rikolti. Ĉu la planto portas fruktojn?

Multaj Ĉinoj, sed ne nur ili, lernis la Internacian Lingvon por praktikaj celoj, Kaj nun ili sin prezentas: "Ni volas rikolti". "Ni volas apliki Esperanto en nia profesio: ekonomio, komerco, aplikita scienco", teĥniko. Kaj nun montriĝas, ke Eŭropo, la semujo (=Samen-hof) de Esperanto, la sidejo de UEA, ne estas tiom progesinta, Ni ne estas pretaj! Ni ne bone faris nian taskon.

Kiel sonas unu mano aplaŭdanta? La lingvo ne kulpas. Vi en Ĉinio faris la ĝustan elekton. Sed ne faru nian eraron; ne estu tro moderaj. Esperanto travivis jarcenton sukcese; ĝi pruvis sian utilon. Postulu de viaj partneroj la aplikon de la Internacia Lingvo. Se ili ne volas kunlabori, lasu ilin investi: donu al ili elekteblecon: Ĉu en Esperanto ĉu en la Ĉina. Mono ĉiam estis bona persvadilo. Postulu de UEA ke ĝi sekvu vian filozofion. Esperanto estu vendata laŭ la modernaj merkatumadaj metodoj. IKEF jam pensas sed bezonas helpon. Guste komercistoj estas ege okupataj homoj kun malmulte da libera tempo.

China Aktief en Oostende montras ke vi pravas. Vi elektis la ĝustan lokon pro via prezentado: Benelukso estas la 4a ekonomia potenco en la mondo, post Usono, Germanio kaj Japanio, kaj en Belgio naskiĝis kaj loĝas la E.K., ido de Benelukso. Gi estas la ĝusta loko por montri ke ekonomia komunumo, celanta internacian komercan kunlaboron, signifas ankaŭ aplikon de komuna lingvo, ne nur ene de la EK, sed speciale eksteren, precipe al nia partnero de la estonto: ĈINIO!"

*Ing. Kees RUIG*



## "Curriculum Vitae de Inĝ. Kees Ruig"

| | |
|---|---|
| Adreso: | Groesbeekseweg 53<br>NL-6581 BJ MALDEN<br>Tel: +31.80.580320 |
| Naskiĝjaro: | 1934 Naskiĝloko: Amsterdam |
| Stato: | edziĝita |
| Profesio: | ĉefkonsilisto pri internacia komerco kaj merkatumado |
| Eduko: | gimnazio<br>maritima kaj teĥnika altlernejo<br>diversaj komercaj kaj merkatumaj kursoj |
| Kariero: | - ŝipveturis 12 jarojn kiel ŝipoficiro, laste kiel ĉefnavigisto<br>- poste funkciis kelkajn jarojn kiel direktoro de la Anne-Frank-domo en Amsterdamo<br>- sekve aktivis en la internacia komerco dum 18 jaroj: unue kiel internacia komercinĝeniero por maŝinoj, poste kiel eksportestro kaj komerca direktoro<br>- fine laboris kiel konsilisto pri internacia komerco kaj departamenta ĉefo en la Ministerio de Ekonomiaj Aferoj kaj la Ĉambro de Komerco kaj Industrio ĝis nun. |
| Spertoj: | Teĥnika komerco pri aparatoj kaj procedoj en la nutraĵa kaj farmaceŭta industrioj<br>- Gastinstruis pri farmaceŭtaj steriligaj procedoj en la universitatoj de Gent, Londono, Moskvo kaj Seulo.<br>- Evoluis novajn teĥnikojn kaj procedojn. |
| Laborteritorioj: | Eŭropo, Norda, Meza kaj Suda Ameriko, Suda kaj Orienta Azioj, Meza Oriento. |
| Verkoj: | Verkis librojn kaj artikolojn pri ĉi-supraj temoj, eksporto, importo kaj internacia merkatumado en diversaj lingvoj. |
| Invento: | Pendigilo por infuzboteloj en malsanulejo, Aŭtomata steriligio. |
| Esploroj: | Profundmezurado surmare inter PRĈ kaj Tajvano. Steriligprocedo por diversaj produktoj.<br>Evoluo de steriligteorio por infuzaĵo, ĝia leĝigo. |
| Iniciatinto de: | - MARRONDO<br>- Nethconsult (kunlabora Asocio de konsultaj ingenieroj)<br>- Fondaĵo por Promocio de Entreprenoj en Nimego k.ĉ.<br>- Societo por Eksterlanda Komerco en Nimego k.ĉ.<br>SERREX (Regiona Eksporta sektreteriato). |

- Komerca kurso por Orienta Eûropano en la kunlaboro kun la Nimega Universitato
- diversaj eksportkombinoj
- kuracturisma projekto.

Kromokupoj:
- alternativaj terapioj
- prezidanto Humanisma Ligo, Nimega distrikto
- instruisto pri Koreio kaj Japanio en Kurso de la Reĝa Tropika Instituto en Amsterdamo.

Hobioj: aziaj kulturoj kaj filozofioj, tajĉiĉuano, jogo, judo, vojaĝado, legado, muziko

Esperanto: sindikato ekde 1949
diversaj estrarfunkcioj (IGA, MERI, AKKE ENA)
dumviva membro de UEA
(fak-)delegito de UEA
membro de IKEF
membro de ENA
verkinto de diversaj artikoloj
kunorganizinto de internaciaj kongresoj
p-r-vojaĝo tra Danlando por la Anne-Frank-fondaĵo
Esperantlingve
reprezentis Anne-Frank-fondaĵon en internacia konferenco pri komunikado (Esperantlingve)

---

**<u>Taal en Bedrijf (Language and Business - Lingvo kaj Entrepreno)</u>**

Gent, Belgio, 22-22 novembro 1992

La provinca alternejo por tradukistoj en Gent okazigos kolokvon pri la problemoj de plurlingva komunikado en entreprenoj.

Temoj estos: bezonataj lingvaj kapabloj (skribaj kaj buŝaj), ebla helpo de esploristoj al la entreprenoj, rolo de fakaj lingvoj en entreprenoj.

Laborlingvoj estos: nederlanda, angla, franca, germana.

Se vi deziras informojn aû se vi intencas prezenti referaĵon, skribu al:

Provinciale Hogeschool voor Vertalers en Tolken
Colloquium "Taal en Bedrijf"
Brusselsepoortstraat 93, B-9000 GENT, Belgio


/RR



L SP R NTO KOM N MO

*Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.*

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:




**La kontaktoj...**
La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

**La eldonaĵoj...**
La plej kompleta Esperanta libroservo regalos vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

**La kunlaboro...**
La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

*Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.*

Por aliĝi aŭ informiĝi pri membreco, kontaktu vian landan peranton (vidu la Jarlibron de UEA), aŭ skribu rekte al:
**Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*)
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon)
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*)
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio)
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj la revuon dum la tuta vivo)

**Komercdeziraj leteroj!**

**Importo, Eksporto, turismo:**
S-ro Radoslav **Paraŝkevov** , j.k. "Strelbiŝte" bl. 8 vh. E, 1408 Sofia, Bulgario, tel: 02.580714
telekopiilo: 042.39192 ĉe firmao "Sonida Ltd"

**Eksporto:** tolaĵo, floroj, fiŝo skviloj kaj fruktoj:
S-ro Mario J. **Ortegón E.**, calle 14 # 1-23, Bogoto, Kolombio

**Nutra oleo, metalo kaj mineraloj:** kaj krome teksaĵo kaj mekanika ekipaĵo celas eksporti la:
Komerc-konsulta Grupo de Tianjin-a Esperanto-Asocio, S-ro Wang **Yubei**, 2-2-303 Baididongli,
Baidilu Nankaiqu, Tianjin China 300193

**Aŭtomobila kompanio:** ankaŭ aŭto-ekipaĵoj, agrikulturaj maŝinoj, elektronika branĉo:
**P.P. Polmozbyt**, Piotra Skargi Str. 12, 93-036 Lódz, Polando, je s-ro Janusz Marek **Krupski**
Telex: 886313, Tel: 849496, 849733, Telekopiilo: 849070
Doma adreso: S-ro Janusz Marek **Krupski**, 91-082 lódz, ul. Srebrzynska 47 M. 52, Polando

**Aŭtoriparado:** Kontakton al (etaj) firmaoj tiufakaj serĉas:
**Auto Spanihel**, S-ro Lumir **Spanihel**, u Tatry 1487,
742 58 Pribor, Ĉeĥoslovakio, CSFR

**Kolorajn televidilojn kaj diktafonojn:** de ĉina entrepreno ŝatas eksporti:
S-ro **Shen Chenru**, Esperanto-Asocio, Academio Sinica,
52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio, tel: 00861.256.1724
Telex: 22474 ASCHI CN, Telekopiilo: 00861.8011095

**Eksportado de Cigna lanugo:**
S-ro Lineckij **Miĥail**, Centro "Esperanto",
SU-252200 Kievo-200, P. O. Kesto 539/1, Tel: 044.2721295,
Telex: 131498 RULON SU - Centro "Esperanto"
Telekopiilo: 044.2287272

**Eta privata firmao:** emas eksterlande komerci Esperantlingve: S-ro Volny **Miroslav**, P. schránka 26, 738 02 F-Místek

**Abelproduktoj:** abelvenenon volas vendi la studento de la medicina universitato kaj abelisto:
S-ro Aleksandre **Levidze**, str. Leninakani 13,
SU-384007 Kutaisi, Kartvelio

**Amplifikiloj, perantaj servoj kaj turismaj ekskursoj:**
Profundan scion je la konstruado de amplifikiloj reklamas eta firmao el Belorusio. En tieaj teritorioj bone eblas ekskursi. Por tio kaj aliajn komercajn aferojn pretas peri:
S-ro Viktor **Dejnekin**, USSR, 220107, Minsk-107,
ul. Narodnaja, 18-6, tel: 017.2.465321



**Retoj por densigita aero:** kaj hidraŭlikaj presmaŝinoj, maŝinoj por plastik-ŝprucado, kompresoroj. pakad-teknikaj instalaĵoj (ĉefe: etikedo-presiloj kaj grandplenumaj industriaj inkoŝprucigaj presiloj) ofertas:
Hyding Ingenieurbüro GmbH, H-6100 Kiskunfélegyháza,
Pf.: Bercsényi u. 15, tel + telekopiilo: 76/62-551
Direktoro: **Marton** Sándor
Ĉefkonstruisto: **Babarczi** Szilvester
Esperantlingva ekstera kunlaboranto: **Bajáki** Imre (IKEF 127)

**Kuracherboj kaj ekstraktoj de tio:** perado kaj produktado organizas dupersona jam urbocentre en Varna, Bulgario, laboranta entrepreno: D-ro Biser Dimitrov **Hadĵiev** ,
str. Sleko Konstantinov 14, BG - 9200 Provadija, Bulgario

**Ofertas firmaan reprezenton en Benino, Afriko:**
S-ro François **Akpa**, B. P. 04-0003,
Telex: 1121 ou 1110 Cotonou, Rep. Pop. du Benin

**Peras domojn aŭ tereno de Portugalio:**
S-ro Manuel José **Pinguinha**, Apartado 269,
2503 C. Raiha Codex, Portugal, Telekopiilo: 062.832680

**Sin prezentas kiel "komunikanto" en Bulgario:** S-ro Ilija **Andreev**, P.K. 120, 9700 Ŝumen, Bulgario, tel: 054.64992

**Muelejo por tritiko, fabrikado de biero kaj pano en Rumanio:** planas, kaj por tio serĉas investantojn:
Dipl.Ing. Dan Bacila, P.K. 75 Lugoj 1800, Rumanio

**Ofertatas sovetiaj Eo-libroj:** faratas anoncoj en sevetia gazetaro. Prezoj malaltas.
S-ro Georgij **Tujakin**, 33A-114, Kornejĉukstrato,
MOSKVO, SU-127543, USSR

/RR/dk

**Esperanto por Gastlaboristoj**

En la proksimeco de Colmar (Francio) troviĝas entrepreno por domkonstruado "Lucchina", de juna esperantisto Michel Basso (IKEF-ano 67). Pro lia entreprenemo, li rapide kondukis malgrandan entreprenon, kiun li heredis de sia patro, al firmao kun 50-o da dungitoj. Li konfrontiĝis kun manko de masonistoj en Francio. Kun mimimuma peno, li akiris pere de Esperanto, 50-o da sinproponoj el eksterlando. En oktobro `91, laboris en lia entrepreno 1 bulgaro, 1 litovo kaj 3 poloj. Evidente, ili parolas inter si kaj kun la estro nur Esperanton. Ili venas per turisma vizo 3-monata. Poste oni provas plilongigi la vizon. En oktobro krome preskaŭ fintraktiĝis kontrakto inter la pola kaj franca registaroj, kio permesos al Basso dungi laboristojn dum 18 monatojn por spertigi en Francio. Sed jam anociĝas nova regreso en la domkonstruado kaj Michel Basso fokusas la atenton nun al la eblecoj de importado de konstrumaterialoj el Orienta Eŭropo. Ankaŭ tiuj kontaktoj okazis dank' al kaj pere de Esperanto. Jen modela ekzemplo de pragmatisma uzo de Esperanto en komerco.

/Ivo Durwael, Belgio

Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!

S-ro Wilfried **Vandevelde**, (IKEF 136),
Barastraat 1, 4e L., B-1070 Brussel, Belgio

S-ro Jos **Vandebergh**, (IKEF 137),
Ambachtstraat 39, B-3530 Houthalen, Belgio

S-ro Jack **Snarberg**, (IKEF 138),
Johan Skyttes väg 15, S-554 48 Jönköping, Svedio

S-ro Yoshihide **Teishima**, (IKEF 139),
4-5 Kobaicho, Kita-ku, Osaka, Japanio 530

S-ro Ian **Jackson**, (IKEF 140),
29 Graham Road, Chiswick, London W4 5DR, Britio

S-ro Georgij **Tujakin**, (IKEF 141),
33A-114, Kornejĉukstrato, SU-127543 Moskvo, GUS

/RR/dk

Adresŝanĝoj; jen la novaj:

S-ro Peter **Berx**, (IKEF 93), Havermarkt 39-7, B-3500 Hasselt

Linguistisches Bureau Alfred **Schubert**, (IKEF 126),
Pf. 1539, D-w8120 Weilheim, Germanio

/RR/dk

Donacoj:

| | |
|---|---|
| Germana membro: | 1.000 gm (20.500 BEF) |
| Yamasaki: | 1.448 BEF |

In-Vento

La germana firmao **Volkswagen** aktuale forte surmerkatigas sian plej novan "inventon", la aŭtomobilon "Vento". Tiu tipo posteulas la "Jetta" kaj aspektas iel pli lukse. Oni divenu ĉu la nova nomo konscie estas (ankaŭ) Esperanta vorto. /dk

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La rajtoj de represo estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk